

La riskoj de la juĝopovo

La malnova afero Sacco-Vanzetti

Dum la jaro 1919, la usona ekonomia kaj sociala vivo estis tre perturbita : inflacio, strikoj, senlaboreco, atencoj per bomboj kontraŭ eminentuloj, manifestacioj kaj kontraŭ-manifestacioj, surstrataj bataloj. La saman jaron fondiĝis la usona komunista partio. En gazetaj artikoloj oni asertis, ke bolŝevistoj eksplodigis la bombojn, sed la publikopinio atribuis al anarkiistoj la atencojn. De la jaro 1888, kiam en Ĉikago (Ilinojso) 6 policianoj estis mortigitaj de bombo ĵetita okaze de anarkia mitingo, multaj usonanoj estis obseditaj de la fremdula terorismo.

En la jaro 1920 multiĝis perarmilaj raboj (1). El uno el ili fontis la tiel nomata afero *Sacco-Vanzetti*.

La 15-an de aprilo 1920, en la urbeto *South Braintree* situanta en la distanco de proksimume 16 kilometroj sude de Bostono (Masaĉuseco) 2 viroj subite proksimiĝis al kasisto kaj gardisto, kiuj piede direktiĝis al fabriko de ŝuoj, por liveri la monon destinitan por la salajro de la tieaj laboristoj. Unu el tiuj viroj plurfoje pafis kontraŭ la kasisto kaj gardisto per revolvero, dum la alia kaptis la 2 monajn metalajn kestojn. La kasisto kaj gardisto surloke mortis. La du krimuloj kaj komplico impete enŝoviĝis en aŭtomobilon, kiu fulmorapide malaperis.

Enketante ĉe la loĝantaro de la urbeto *South Braintree*, la polico kaj detektivoj nur eksciis, ke unu el la agresintoj surhavis kaskedon kaj la alian feltan ĉapelon.

Nokte la 5-an de majo 1920, 2 policianoj arestis 2 fremdulojn en tramo sekve de anonima denuncio pri klopodo ŝteli aŭtomobilon. En la policejo, la 2 suspektitoj estis pripalpita kaj pridemandita. Ambaŭ posedis revolveron kun kartoĉoj kaj itallingvan anoncon pri anarkiista kunveno. Ili deklaris sian respektivan nomon: *Nicola Sacco*, *Bartolomeo Vanzetti*. Post pridemandado, kiu daŭris dekelke da minutoj, la 2 suspektitoj estis enŝlositaj.

La 6-an de majo 1920, la distrikta prokuroro *Katzmann* daŭrigis la pridemandadon en la policejo kaj decidis sendi la suspektitojn antaŭ la proksima tribunalo pri monpunindaj leĝrompoj (2), kie la juĝisto kulpigis ilin pri la fakto, ke ili malpermesite havis armilon. *Nicola Sacco* estis kondukita al la mallibero de la urbo *Dedham*, dum *Bartolomeo Vanzetti* estis sendita al tiu de la urbo *Plymouth* sekve de la deklaro farita de viro, kiu pretendis, ke la koncernato troviĝis sur la loko

de la perarmila rabo okazinta en la urbe-
to *South Braintree*.

La 22-an de junio 1920, antaŭ la tribunalo de la urbo *Plymouth* komenciĝis la proceso kontraŭ *Bartolomeo Vanzetti*, kiu estis akuzita pri atako kun la intenco ŝteli kaj murdi. Prezidis en la tribunalo la juĝisto *Thayer*, kiu ne havis simpatio por la fremduloj. La prokuroro *Katzmann* apogis sian akuzadon ĉefe sur la deklaroj de la kulpigaj atestantoj (3) kaj provis senkreditigi la atestaĵojn favorajn por la akuzito. Ĉiuj atestantoj de la defendo estis italoj, kiuj esprimis sin pere de interpretisto, tiel ke la ĵurianoj havis la impreson, kvazaŭ tiuj atestantoj estis komplicoj.

La 16-an de aŭgusto 1920, advokato prezentis objektojn, kiuj estis balaitaj. La saman tagon, *Bartolomeo Vanzetti* estis kondamnita al malliberego dum 12 jaroj kaj al punlaboro dum 3 pliaj jaroj en Bostono.

En la fino de la jaro 1920, anarkiistoj fondis defendan komitaton en Bostono, kaj venigis kalifornian advokaton nomitan *Moore*, kiu famis pri sukcesaj defendoj de sindikatanoj kaj laboristoj. Instinkte tiu ambicia advokato sentis, ke loka banala perarmila rabo povas fariĝi tutmonda evento. Li utiligis la publikecon rezervitan en Usono por la grandaj krimaj aferoj kaj por la bonfaremaj agoj. Li skribis, telegrafis, vojaĝis, helpvokis, delegis kunlaborantojn kaj volontulojn. En la fino de la jaro 1920, certa emocio disvastiĝis en Usono kaj ĝi eĥiĝis en diversaj aliaj landoj.

Tamen la leĝa funkciado daŭris kun burokrata reguleco. La 31-an de majo 1921, en la juĝodomo (4) de la urbo *Dedham* malfermiĝis la proceso pri la cirkonstancoj de la mortigoj okazintaj en la urbe-
to *South Braintree* la 15-an de aprilo 1920. *Nicola Sacco* kaj *Bartolomeo Vanzetti* troviĝis en la akuzitejo (5).

Sub la aŭtoritato de juĝisto *Thayer* 12 ĵurianoj (6) estis elektitaj post multaj malagnoskoj aŭ rifuzoj en la ĉeesto de la akuzitoj. La unuaj atestantoj intersekvis sin senrezulte ĉe la bariero (7). La prokuroro *Katzmann* kalkulis je grava atestanto, kiu lastmomente rifuzis rekoni la akuziton *Nicola Sacco*. Sekve de tiu interokazaĵo, la koncerna atestanto estis eksigita de sia laborejo. De sia flanko la juĝisto *Thayer* pli kaj pli koleris pri la agitfolioj disdonitaj de la defenda komitato, por anticipe denunci la maljustecon de la proceso.

Antaŭ la tribunalo, la dubo pri la kulpeco de *Nicola Sacco* ŝajni forviŝiĝi, kiam du maljunaj fraŭlinoj, kontistinoj, asertis, ke li troviĝis inter la banditoj. Defen-

da atestantino surprize deklaris kulpa la akuziton. La advokato *Moore* turmentadis ŝin tiom, ke la ĵurianoj sentis simpatian al ŝi kaj kredis al ŝi laŭ ŝia vorto. Por kompensi la damaĝon faritan de tiu atestantino, la advokato venigis 5 personojn, kiuj kapablis refuti ŝian diron. *Bartolomeo Vanzetti* estis pli-malpli precize identigita de 5 atestantoj. Male, pluraj personoj certigis, ke ili renkontis la akuzitojn sur diversaj lokoj, dum okazis la krimoj. Akuzaj kaj defendaj ekspertizistoj pri balistiko konfuze diskutis pri la konformeco de la mortigaj kugloj kun la kalibro de la revolveroj, kiujn posedis la akuzitoj.

Ekde la 5-a de julio 1921 komenciĝis la atesto de la akuzitoj. *Bartolomeo Vanzetti* rakontis pri siaj okupoj la 15-an de aprilo 1920 : li vendis pordalporde fiŝojn en la urbo *Plymouth*. *Nicola Sacco* deklaris, ke la 15-an de aprilo 1920 li estis en Bostono por akiri pasporton ĉe la itala konsulejo. Lia edzino *Rosina* atestis, ke ili ŝparis monon, por reiri en Italion. La prokuroro *Katzmann* reliefigis lian fuĝon en Meksikurbon, por eskapi el la mobilizado en la jaro 1917. Siavice *Nicola Sacco* abunde kaj pasie parolis kontraŭ la militoj. Li pensis, ke la polico tiam arestis lin, ĉar li estis anarkiisto kaj dizertinto.

Komenciĝis la pledadoj. La advokato *Moore* reliefigis la kontraŭdirojn de la atestantoj koncerne la identigon de la akuzitoj. La prokuroro *Katzmann* vokis al ĵurianoj por konsidero al liaj akuzoj.

Sekve de kunveno, la prezidanto de la ĵurio verdiktis: « kulpaj pri murdo en la unua grado » (8). La juĝisto *Thayer* malakceptis revizion de la proceso. En la urbo *Dedham*, laŭ la vidpunkto de la tribunalo, de la ŝerifoj (9), policianoj kaj de multaj loĝantoj, la 2 akuzitoj estis kulpaj pro la fakto, ke ili troviĝis en la akuzitejo.

En oktobro 1921, la verdikto naskis manifestaciojn en Francio, Italio, Svisio, Belgio, Hispanio, Portugalio, Skandinavio kaj poste en Centro-Ameriko kaj Sud-Ameriko.

Post enketoj, la 4-an de majo kaj la 11-an de septembro 1922 la advokato *Moore* deponis aldonajn mociojn pri la dubindeco de la deklaroj de iuj akuzaj atestintoj.

En la malliberejo de la urbo *Dedham*, *Nicola Sacco* fariĝis pli kaj pli amara kaj regata de la deliro pri persekuto. Per letero li esprimis sian malpardonemon al la advokato *Moore*, kiu estis ŝokita kaj definitive forlasis Bostonon en novembro 1923.

En la jaro 1924, la juĝisto *Thayer* rifuzis ĉiujn deponitajn mociojn pri la dubin-

teco de la deklaroj de iuj akuzaj atestintoj. Fakte, tiuj mocioj prokrastis la ekzekuton de la kondamnitaj, ĉar ili levis jurajn demandojn solveblajn nur de supera instanco.

La defenda komitato multekoste varbis eminentan bostonan advokaton nomitan *Thompson*, kiu sin turnis al juna kolego, por klarigi la sekretojn de la aktivajoj de bando da gangsteroj troviĝanta en la ĉefurbo *Providence* de la ŝtato Rod-Insulo (*Rhode Island*). En la jaro 1926, tiu advokato konvinkiĝis, ke la koncerna bando respondecis pri la krimo okazinta en la urbeto *South Braintree* kaj li faris deklarojn pri tio.

En majo 1926, la Plejalta Kortumo (10) de Masaĉuseco malakceptis la apelacion prezentitan de la advokato *Thompson*, ĉar la juĝisto *Thayer* ne faris juran eraron. La bostona ĝenerala prokuroro malpermesis, ke la advokato konsultu ĉiujn dosierojn, kiujn posedis la usona ministrejo pri justico koncerne la kondamnitajn. En septembro, la juĝisto *Thayer* rifuzis nuligon de la verdikto spite konfesojn de gangstero.

En marto 1927, profesoro pri Juro en la fama universitato *Harvard* (en la urbo *Cambridge* - Masaĉuseco) publikigis en monata gazeto artikolon, kiu estis atako kontraŭ la proceso, la ĵurio, la atestantoj, la verdikto kaj la masaĉuseca justico.

La 5-an de aprilo 1927, la Plejalta Kortumo sankciis la decidon de la juĝisto *Thayer*. La prokuroro petis la ekzekucion de la juĝdecido.

La verkistoj *Henri Barbusse*, *Romain Rolland* kaj la fizikisto *Albert Einstein* sendis telegramon al la usona prezidento *Coolidge* por insiste peti la liberigon de la kondamnitaj.

La masaĉuseca ŝtatestro *Fuller*, kiu estis favora al la mortopuno, anoncis, ke li havas neniun opinion pri la afero, ĉar la pruvoj neniam estis alportitaj al li.

En la tribunalo de la urbo *Dedham* okazis la lasta kunsido en la ĉeesto de la juĝisto *Thayer*, kiu eldiris la juĝdecidon post deklaroj pri senkulpeco faritaj de la kondamnitaj: « ... la mortpunon per la paso de kurento tra via korpo en la semajno komenciĝanta dimanĉe, la 10-an tagon de julio de la jaro de Nia Sinjoro 1927. Tia esta la leĝa juĝdecido ».

Jean Selle

Noto. La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de la libro titolita *L'affaire Sacco-Vanzetti*, verkita de la historiisto kaj ĵurnalisto *Francis Russell*, eldonita de la firmao *Robert Laffont* en la jaro 1964.

- (1) perarmilaj raboj = *hold-up*.
- (2) tribunalo pri monpunindaj leĝrompoj = *tribunal de simple police*.
- (3) kulpigaj atestantoj = *témoins à charge*.
- (4) juĝodomo = *palais de justice*.
- (5) akuzitejo = *box des accusés*.
- (6) ĵurianoj = *jurés*.
- (7) ĉe la bariero = *à la barre du tribunal*.
- (8) kulpaj pri murdo en la unua grado = *coupables de meurtre au premier degré*.
- (9) ŝerifoj = elektitaj oficistoj komisiitaj pri publika ordo.
- (10) Plejalta Kortumo = *cour suprême*.